

Leterkesto

Claude Gacond, 334-a radioprelego, 1970.03.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Revenis la momento por malfermi nian leterkeston kaj konversacii kun niaj geaŭdantoj.

A.- Sinjoro Jiří Patera en Most, Ĉeĥoslovakio, skribas pri la malbona aŭdebleco de niaj vesperaj elsendoj. Sed li ankaŭ diras : « *Mia ricevilo ne estas aranĝita por la kurt-ondoj.* »

Cl.- Ni atentigas niajn geaŭdantojn, ke Radio-Svislando eldonis broŝuron, kiu klarigas al la regulaj aŭskultantoj kiel plibonigi la aŭdpovon de ilia radio-ricevilo per aldono de anteno. Se vi deziras ricevi tiun libreton, kiu bedaŭrinde ne estas presita en esperanto, avertu nin pri la naciaj lingvoj, kiujn vi kapablas legi. Ĝi estas eldonita en la germana, franca kaj angla. Ĝi donas konsilojn por la konstruo de kurtonda anteno.

A.- Sinjoro Lennart Aberg [oberj] en Gotenburgo, Svedio, petas la pruntedonon de unu el niaj manuskriptoj, ĉar li ne povis aŭdi unu el niaj prelegoj. Ofte venas al ni similaj demandoj. Ni bedaŭrinde ne povas jese respondi al similaj demandoj.

Cl.- Tiu sveda aŭskultanto skribis al ni per poŝtkarto de Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio. Estus interese, se ni foje povus raporti pri tiu societo, kondiĉe ke radio-aŭskultanto donos al ni la necesajn informojn. Eble sinjoro Lennart Aberg akceptos tion fari.

A.- Sinjoro Gotfried Beyer en Karlsruhe, Okcidenta Germanio, skribas : « *Vi skribis en via program-kajero, ke vi projektas novan programplanon. Tial mi petas : favoru Esperanton ! Vi povus pliriĉigi vian programon per dissendo de novaĵoj el Esperantio kaj antaŭ ĉio el la svisaj Esperanto-grupoj, kiam neniu radiostacio dissendas Esperanto-programojn.* »

Cl.- Tutcerte kiam la esperantistoj estos pli multnombraj, aŭ kiam ili skribos pli ofte al la radio-elsendoj, tiam esperanto-programoj plioftiĝos. Ili respegulas la forton de la esperantomovado.

A.- Gesinjoroj Antonija kaj Teodoro Arbergs en Riga, Latvia Sovetio, skribis longan kaj interesan leteron. Ni menciis, ke estas la unua letero, kiun ni ricevas el Sovetio. Ĉu en tiu vastega lando ni havas aliajn geaŭdantojn ?

Cl.- Gesinjoroj Arbergs estas tre fidelaj aŭskultantoj, kiuj jam aŭskultis Edmond Privat. Ili memoras, ke li ofte prelegadis pri la vivo de Mahatma Gandhi.

A.- Sinjoro Romain Chambaz en Etampes, Francio, ŝatas la diversecon de niaj elsendoj.

Cl.- Sinjoro Franz Tischer en Magdeburg, Orienta Germanio, ricevis la libron *Vivo de Gandhi* de Edmond Privat, kiun ni sendis al li antaŭ kelkaj monatoj. Li estas kontenta, ke lia lando nun ekuzas esperanton. Jes, ĝi eldonis 260-paĝan libron, kiu estas titolita *Faktoj pri Germana Demokratia Respubliko*.

A.- Sinjoro Arne Pedersen en Herning, Danlando, esprimis sian intereson pri la Dialogoj, kiuj permesas modernigi la esperanto-instruadon. Kun plezuro ni sendas tiun dokumenton kun informoj metodologiaj. Temas pri provizora eldono. Pluraj eroj, laŭ la kritikoj ricevitaj kaj ricevotaj, estas reverkendaj.

Cl.- Ĉar tiu reverkado ne ankoraŭ okazis, ni esperas, ke la ricevantoj de tiuj dialogoj esprimos siajn vidpunktojn. Kaj se ili deziras eksperimenti tiujn dialogojn dum kursoj, ili povas mendi aliajn ekzemplerojn, kiuj kostas po du svisajn frankojn ekzemple, tio estas kvar internaciaj respond-kuponoj.

A.- Sinjoro D. F. Coates en Pontefract, Britio, tre interesiĝis pri niaj prelegoj pri la programita instruado.

Leterkesto

Claude Gacond, 334-a radioprelego, 1970.03.04 & 07

Cl.- Sinjoro Henri Perriard en Chabrey, Svislando, plendas pri la manko de radio-elsendoj je mezaj ondoj. Tiun plendon ni jam ricevis de multaj svisoj, sed ili ne koncernas nin. La plendantoj sin turnu al la direktoro de la Svisa Societo de Radio-elsendado.

A.- Sinjoro L.-H. Brans en Veyhel, Nederlando, ŝatis la karikaturajn de Baghy kaj petas la numerojn de la gazeto *Svisa Espero*, kie ili aperis. Li informiĝas, por scii, kiom ili kostas. Tiu sendo estas senpaga.

Cl.- Ni ĵus legis al vi po unu nomon de salutantoj el tiuj landoj. Ni nin demandas, ĉu en la aliaj landoj ni havas regulajn aŭdantojn. Ni ripetas al vi tiujn landojn, el kie venis salutoj : Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francio, Okcidenta kaj Orienta Germanioj, Nederlando, Sovetio, Svedio kaj Svislando.

A.- Se hodiaŭ vi aŭskultas Radio-Svislandon kaj loĝas en alia lando, faru al ni vivsignon per sendo de poŝtkarto. El Italio, Aŭstrio kaj Hispanio ni malofte ricevis saluton. Ĉu en tiuj landoj ne ekzistas esperantistoj ?

Cl.- Aŭ eble ili ne estas aŭskultemaj. Ili ne havas la necesan persistemon. Jes, ni scias, ke ne estas tre facile dompti la kurt-ondojn.

A.- Alvenis al ni multaj aliaj salutoj. Ni daŭrigas tiun elsendon respondante al kelkaj el ili.

Cl.- Ni salutas sinjoron Antonio Pellanda en Winterthur, Svislando, kiu okupiĝas pri la sonbenda gazeto por blinduloj. Ĉu multaj blinduloj aŭdas niajn prelegojn ? Ni ne scias, ĉu ili estas neskribemaj verŝajne pro sia blindeco.

A.- Petas la dialogan kurson pluraj geaŭdantoj. Ricevos ĝin sinjoro René Isnardon en Cannes, Francio, gesinjoroj Ernst Muthschall en Halle, Orienta Germanio, sinjoro Walter Kaukal en Neustadt en Weinstrasse, Okcidenta Germanio, sinjoro Peter Erbe en Halle, Orienta Germanio, gesinjoroj F. kaj B. Najbaro en Keighley, Britio.

Cl.- Kiel vi povas konstati, tiuj prelegoj pri la uzo de la dialogado en la instruado interesis multajn geaŭdantojn.

A.- La venontan semajnon ni remalfermos nian leter-keston, ĉar en ĝi restas pluraj salutvortoj. Do se vi deziras aŭdi respondon al via saluto aŭ se vi deziras iomete konatiĝi kun la aliaj geaŭdantoj, ne forgesu enŝalti vian radio-ricevilon.

Cl.- Vi aŭdis babiladon kun la geaŭdantoj de Radio-Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-